

Heinrich Heine,
The Lorelei

tradukita de L. W. Garnham

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Heinrich Heine,
Lorelejo

tradukita de Joachim Gießner

Tiu traduko estas poste iom modifita de aliujoj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

I do not know what it signifies.
That I am so sorrowful?
A fable of old Times so terrifies,
Leaves my heart so thoughtful.

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

The air is cool and it darkens,
And calmly flows the Rhine;
The summit of the mountain hearkens
In evening sunshine line.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

The most beautiful Maiden entrances
Above wonderfully there,
Her beautiful golden attire glances,
She combs her golden hair.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

With golden comb so lustrous,
And thereby a song sings,
It has a tone so wondrous,
That powerful melody rings.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

...

...

...

The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia ve- tur’; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipet’ iras sur la rive- ro, ŝipisto ektremis de l’ kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kan- tanto.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo- ci’. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!
--	---	--	---

I believe the turbulent wa- ves Swallow the last shipper and boat; She with her singing craves All to visit her magic moat.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat’, Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad’.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l’ akvo- turnado; ĝin Lorelej’ faris kruela, per sia mirinda kan- tado.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat’. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad’.
---	--	--	--

*Traduko de la Germana poe-
mo “Die Lorelei” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17) en la Anglan de
L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11
23:04:57)

*L. W. Garnham, Bachelor of
Arts, LEGENDS OF THE
RHINE; mentioned in: A
Tramp Abroad. Vol 1-2. Leib-
zig: Tauchnitz, 1880 Band I,
Mark Twain 1880*

*Traduko de la Germa-
na poemo “Die Lorelei”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton
de LEOPOLD ELB
(†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03
19:06:30)

*La traduko troviĝas
sur paĝo 84 de la
lernolibro „Post la
kurso“ de Wilhelm
kaj Hans Wingen,
eldonita de Ludwig
Pickel en Nurem-
bergo (Nürnberg),
Germanio.*

*Traduko de la Germa-
na poemo “Die Lorelei”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton
de LUDWIG LAZARUS
ZAMENHOF (Ludoviko
Lazaro Zamenhofo,
*1859-12-15 – †1917-
04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30
16:15:09)

*Tiun ĉi traduk-
version mi prenis
el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germa-
na poemo “Die Lorelei”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton
de JOACHIM GIESSNER
(*1913-12-23 – †2003-
11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-
15 12:51:51)

*Tiu ĉi poem-traduko
aperis en la kant-
kolekto “Mia kantaro
I”, eldonita de Josef
Schiffer (Wilstorfstr.
58, D-78050 Villingen-
Schwenningen,
Germanio, tel.
0049(0)7721-58991;
faks. 0049(0)7721-
508891, ret-adreso:
Josef.Schiffer@
t-online.de), n-ro
30. Krome ĝi aperis
en la informilo “Fer-
voja Esperantisto” de
Germana Ferjojista
Esperanto-Asocio, n-ro
3/2010, sur paĝo 3.*